Thomas Moore,

# La lasta rozo

*tradukita de Antoni Grabowski*

*kun ok-liniaj strofoj*

Jen floras sola, forlasita
La lasta rozo de l' somero,
Dum ĝia ĉarma gefrataro,
Velkinte kuŝas jam sur tero.
Ne estas ia flor' parenca,
Nek roz-burĝono en proksimo,
Por interŝanĝi la ridetojn
Aŭ la sopirojn, laŭ kutimo.

Mi vin ne lasos, ho soleca,
Ĉagrene sur trunketo brili;
Ĉar la karuloj viaj dormas,
Do iru, dormu vi kun ili!
Foliojn viajn mi afable
Disĵetas sur bedeto jena:
Vi kuŝu apud senaroma,
Malviva kunular' ĝardena!

Mi tiel sekvu, kiam pasos
De l' amikeco flor' fidela,
Kaj el brilanta amo-ringo
Elfalos lasta ŝton' juvela.
Ĉar kiam velkis veraj koroj,
Sentemaj flugis for el rondo,
Ho, kiu volus tiam loĝi
Solece en malvarma rondo?

...

Thomas Moore,

# La lasta rozo

*tradukita de Clarence Bicknell*

*kun ok-liniaj strofoj*

Jen la lasta rozeto
de fora somer'!
Ĝiaj belaj kunuloj
jam velkis sur ter'!
Ne restas parenco,
ne unu rozflor'
Partoprenas kompate
en ĝia dolor'.

Mi ne lasos vin velki
tutsola, ho roz'.
Iru dormi kun ili
en paca ripoz'.
Nun viajn petalojn
disĵetas mi for
Al viaj kunuloj
sen viv', sen odor'.

Tiel same volonte
formortus mi mem,
Se ne plu min atendus
amika manprem'.
Ĉar kiu kun koro
en tiu ĉi mond'
Volus loĝi izola
sen amo-respond'?

...

Thomas Moore,

# Letzte Rose

*tradukita de Friedrich Wilhelm Riese*

Letzte Rose, wie magst du
so einsam hier blühn?
Deine freundlichen Schwestern
sind längst, schon längst dahin
Keine Blüte haucht Balsam
mit labendem, labendem Duft
keine Blätter mehr flattern
in stürmischer Luft.

Warum blühst du so traurig
im Garten allein?
Sollst im Tod mit den Schwestern
mit den Schwestern vereinigt sein
Drum pflück ich, o Rose
vom Stamme, vom Stamme dich ab
Sollst ruhen mir am Herzen
und mit mir, ja mit mir im Grab.

...

*Traduko de la Angla poemo "'T is the Last Rose of Summer " de* Thomas Moore *(∗1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de* Antoni Grabowski *(∗1857-06-11 – †1921-07-04).*

*Arg-531-1059 (2010-03-28 21:24:14)*

*Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, kopiis el la retejo* `http://www.netlibrary.net/eBooks/Wordtheque/eo/221211.TXT`.

*Traduko de la Angla poemo "'T is the Last Rose of Summer " de* Thomas Moore *(∗1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de* Clarence Bicknell *(∗1842-10-27 – †1918-07-17).*

*Arg-531-1060 (2014-02-15 14:00:59)*

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en folio kun kantoj prezentitaj dum la 12a jarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), la 12-an de oktobro 1968. Pri la tradukinto vidu la retejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Clarence_Bicknell`.

*Traduko de la Angla poemo "'T is the Last Rose of Summer " de* Thomas Moore *(∗1779-05-28 – †1852-02-25) en la Germanan de Friedrich Wilhelm Riese.*

*Arg-531-1061 (2010-03-29 02:00:11)*

*Text: Friedrich Wilhelm Riese - 1830 - (1847 in der Oper " Martha " von Flotow ) - vermutlich von einem Gedicht des irischen Lyrikers Thomas Moore angeregt: „Des Sommers letzte Rose blüht hier noch, einsam rot...“ Musik: nach dem irischen Volkslied: Groves of Blarney ? Siehe:* `http://www.volksliederarchiv.de/text3289.html`. *auf die gleiche Melodie wird gesungen*